# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
9.5.1974

BRASÍLIA DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal 31 - Ap. 73
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07-1055
Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

MARÇO DE 1975 - BOLETIM INFORMATIVO - - - - - - - - - - - - Redação:-M. Almada

## KIAL KAJ KIEN PERE DE ESPERANTO?

"La lingvo internacia "Esperanto" en mallonga tempo trovis multegon da amikoj en diversaj landoj. La nombro de tiuj ĉi amikoj kun ĉiu tago, kun ĉiu horo kreskas, kaj num jam forte estas sentata la bezono de la organo, kiu interligus ĉiujn la disĵetitajn amikojn kaj donus al ili la eblon paroli kaj konsiliĝi unu kun la alia", skribis D-ro Zamenhof en la unua gazeto "La Esperantisto", eldonita en Nurnberg (Germanujo) en la 1-a de Septembro 1889.

La vortoj de Zamenhof, en nia tempesta kaj moderna epoko, samvaloras. Estas nepre bezonate unuigi, en vasta kaj progresema Brazilo ankaŭ niajn "disĵetitajn amikojn". La esperanta movado bezonas ilin.

Jen la ĉefa programo de Brazila Konsilantaro en nia lando.

La gazetaro, la TV, la radio kaj aliaj komunikiloj informas nin ĉiutage pri malamo inter la popoloj. La homaro iĝis maŝineca, brutala, sen ia ajn homa sento. Neniu havas tempon, nek sentas la problemon de sia samsortano. La samo okazis en la epoko de nia Majstro. En tiaj cirkonstancoj naskiĝis Esperanto, la lingvo de la futuro, la plej utila ilo por la interkompreniĝado

Zamenhof kreis lingvon por faciligi la disvastigon de ideo pri tutplaneda unuiĝo kaj interalproksimiĝo de ĉiuj individuoj kaj ĉiuj nacioj de la Terglobo.

Al kio utilas Esperanto? -demandas multaj skeptikuloj. Kial ĝi ankoraŭ ne triumfis? - Nu, ĝia fiasko esta nepra.

Jes, eble tio okazus se ĝi ne estus praktike aplikata.

Antaŭ 86 jaroj aperis la unua esperanta gazeto, "La Esperantisto" kaj ekde tiam aperis sennombraj gazetoj, libroj skribitaj en Esperanto kaj tradukaĵoj de la plej famaj aŭtoroj en la internacia lingvo, ke ĉiu nacio konatiĝu kun alia, ke disvastiĝu la mondkulturo. Esperanto vivas kaj en prozo kaj en verso. Iom post iom la internacia lingvo estas uzata en turismo, komerco kaj eĉ en diplomatiaj interrilatoj, ke ni ne forgesu pri interamikiĝo.

Esperanto naskiĝis antaŭ 88 jaroj kaj jam sukcesis penetri en ĉiujn landojn de la mondo. Ekzistas naciaj lingvoj, kiujn oni dum jarcentoj altrudadas al la mondo, ekonomie kaj politike, tamen ili ĝis nun ne triumfis.

Multaj postulas, ke Esperanto estu en kondukita oficiale en la lernejojn de ĉiuj landoj de la mondo. Se la definitiva enkonduko okazus, ili rekonus la va

(daŭrigo sur paĝo 3)

## NOTÍCIAS

VALENÇA - Nesta cidade do Estado do Rio de Janeiro ocorrerá em julho p. futuro o X Seminário Brasileiro de Esperanto promovido pela Cooperativa Cultural dos Esperantistas. Frequentam o curso de Esperanto na mesma cerca de 100 alunos. O curso é ministrado pela Faculdade de Filosofia, Ciências e Letras.

SÃO PAULO - Em São Paulo, onde mantém curso de Esperanto na FEESF, aos sábados, o Dr. Arnaldo Vianna, batalhador incansável, publicou interessante artigo na Folha Espírita sob o título "O Esperanto é a Língua dos Espíritas?" em cujo contexto inseriu linda poesia de Castro Alves, que passamos a transcrever, dada a propriedade do momento:

"O ESPERANTO

Esperanto - mensageiro
de encantados tempos novos
erguerá nações e povos
do caminho de lodo e pó.
Da harmonia timoneiro,
que portos da paz descerra,
libertará toda a Terra,
Na glória de um mundo só!

Vemo-lo já no futuro
fulgente, impávido e forte,
vencendo a miséria e a morte
- luz fraterna em sendas mil!
Chave de amor santo e puro,
abrirá caminhos grandes,
do altivo Himalaia aos Andes,
da Cochinchina ao Brasil.

Nessa eminência sublime
do mundo regenerado,
não haverá Jovem irado,
cujos carros fugirão:
nem Babilônias do crime
bebendo em festins sangrentos,
nem purpúreos paramentos
de senhores da ilusão.
Seus luzidos estandartes
brilhando no mundo inteiro
abolindo o cativeiro
a quem a maldade conduz:
convertendo os Bonapartes
em benfeitores amados,
de canhões - forjando arados,
de balas - penas de luz.
Hifen de sol, religando
os Templos da Humanidade,
da grande fraternidade,
fazendo virtude e lei;
orgulho triste e nefando,
que torvas guerras produzes,
espadas, fuzis, obuzes,
mentiras, trevas - tremei,
na Terra ainda há sombra inglória
Da noite do mundo velho.
Embora seja o Evangelho
o amor que do Alto reluz!
No limiar da vitória
das verdades do Infinito,
Esperanto! Sê bendito
ao doce olhar de Jesus!"

Pedimos aos nossos vice-presidentes para enviar-nos reportagens sobre o movimento esperantista de suas regiões. Serão publicadas em nosso Boletim.

## NOTÍCIAS

TAUBATÉ - Na próspera cidade de Taubaté (SP) vem sendo realizado um curso intensivo da Língua Internacional, das 20 às 21,30 horas, todas as terças-feiras, a cargo do Cap-PM Juvenal Tavares da Silva. As aulas são ministradas no Ginásio Municipal de Aplicação, tendo uma frequência de 20 alunos.

§)--- A Associação Paulista de Esperato levou a efeito na Chácara Esperanto, de propriedade do Capitão Tavares da Silva, um animado Piquenique em que tomaram parte somente esperantistas e simpatizantes do idioma internacional. Além de elevado número de esperantistas de São Paulo, afluiram ao local esperantistas de São José dos Campos, de Caçapava e de Taubaté.

Tais encontros são promovidos a fim de que os esperantistas pratiquem o uso da língua, desenvolvendo seus conhecimentos.

SOROCABA - Continua seu trabalho valioso de divulgação da Língua Internacional a Rádio Clube de Sorocaba, (1080 Khz) de 21 às 22 horas, todos os domingôs, trabalho feito pelo samideano Manoel Blaz Garcia.

BAGÉ - Do Rio Grande do Sul, mais propriamente de Bagé, temos recebido o órgão oficial do Grupo Esperanto kaj Frateco - Esperanto Aldono.

NO ESTRANGEIRO

A revista "Esperanto" traz-nos, como sempre ótimas informações sobre o movimento esperantista de todo o mundo.

§) - 60º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

O 60º Congresso Universal de Esperanto deverá acontecer entre os dias 26 de Julho e 2 de Agosto p.f. na cidade de Kopenhague (Frederiksberg), na Dinamarca, estando sendo previsto um novo estilo para o certame, uma vez que o presidente da Associação Universal de Esperanto foi eleito no último congresso, ocorrido em Hamburgo, Alemanha, e, com seus novos auxiliares já vem debatendo novas formas de promover o certame, utilizando novas idéias, com discussão e visão de novas perspectivas.

§) O Órgão do Movimento Esperantista Bi-Mensal "Heroldo de Esperanto" traz sempre excelentes reportagens de quase todos os recantos do mundo, procurando atualizar o movimento esperantista entre seus leitores.

(daŭrigo de la paĝo 1)

loron de la mondlingvo kaj tiam volonte ellernus ĝin.

Nu, se tiuj personoj deziras, ke la utiligo de nia lingvo okazu vastskale ne serĉu pruvojn, ne starigu postulojn, sed eniru en nian movadon, lernu la lingvon kaj helpu al ni disvastigi nian supernacian ilon. Tiel la venko de Esperanto okazos rapide.

Se ni unuigas niajn fortojn, se ni interfratiĝas ni eble ne savos la apatian modernan mondon, sed ni estu certaj pri tio, ke inter la homaro regos pli da amikeco, paco kaj amo.

M.A.

NOVOS VICE-PRESIDENTES

De conformidade com o Artº 8º dos estatutos da sociedade, a Diretoria do Conselho Brasileiro de Esperanto, por unanimidade, acolheu os eminentes esperantistas abaixo designados como vice-presidentes para as especialidades seguintes:

MATEMÁTICA - Professor Wanderley Peres, da cidade de Indaiatuba (SP).

INTERRELACIONAMENTO NACIONAL - Major Gilberto A. Silva Velho, de Caçapava-SP.

CONFERÊNCIA - Convidado pelo Professor Wanderley Peres, de Indaiatuba, o presidente do nosso Conselho Brasileiro de Esperanto, professor F. S. Almada, consentiu em se dirigir àquela cidade paulista, afim de proferir uma conferência sobre o Esperanto, o que deverá acontecer proximamente no Ginásio Estadual daquela localidade.

-- X --

DISTINGO AL JOZEF VEĈEI

"Heroldo de Esperanto" de Februaro informas: "La prezidanto de Jugoslavio J. Broz Tito distingis per arĝenta stelo, pro meritoj faritaj al la popolo, S-ron Jozef Veĉei el Novi Sad. La distingo estas donita laŭ propono de la Esperanto-Societo de Novi Sad, kies kunfondinto estas S-ro Veĉei.

Samideano Veĉei estas vera simbolo de sindona esperantisto kaj sincera defendanto de esperanta ideologio.

Veĉei estas unu el la pioniroj pri disvastigo de la internacia lingvo en Jugoslavio. Post la unua mondmilito grupo da samideanoj fondis la Esperanto-Societon kaj unu el la grupo estis samideano Veĉei. Dum longa tempo li persone subtenis la societon morale kaj materiale. En luita ĉambreto, kie mankis lumo eklaboris la novbakita societo. Kiu enkondukis la elektrofluon, pentris propramane la ejon estis s-ano Veĉei. Dum multe da tempo li portadis la hejtaĵon al la societo. Li ne nur tion faris, sed ankaŭ purigis la salonon kaj instruis al la lernantoj. Longe li estis la ĉefa kolono de la esperanta movado tie, kaj laŭvorte sekvis la instruojn de Zamenhof: "Obstine antaŭen! La nepoj vin benos, se vi pacience eltenos".

S-ano Veĉei plene meritas la rekonon de la popolo kaj gubernio. Nemultaj esperantistoj estas tiel sindonaj, kiel s-ano Veĉei. Li neniam laboris por gajni gloron. Lia plej granda ĝojo estas, kiam la kurso marŝas bone kaj la anara nombro kreskas.

Nia elkora gratulo al s-ano Veĉei kaj al nia movado, kiu posedas homojn tiajn, kiel s-ano Jozef Veĉei, kies ekzemplo estas vere imitinda tra la tuta mondo.

-------xxxxxxxxx------

NOTA DA REDAÇÃO - Como foi prometido, nosso informativo procurará utilizar as duas línguas: Esperanto e Português, a fim de poder ser lido por esperantistas e não esperantistas. Receberemos e publicaremos trabalhos de nossos vice-presidentes, para conhecimento geral em todo o território nacional, os quais deverão ser encaminhados para a Rua Galeão Carvalhal, 31 apto. 73 Santos (SP) - residência do Redator-Chefe.